

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

Ĵaŭdon, la 30-an de Junio, 2016 • numero tri

## Pri la orikteropo

de Derek ROFF

Saluton al vi, ĉiuj membroj de nia dumtempa komunumo de NASK kaj KTF.



Mi nomiĝas

Derek ROFF, el Santa Fe, Nova Meksiko, kaj mi studas en la kurso de Bertilo. Mi ankaŭ aktivas en KTF, por kiu mi anticipe verkis teatraĵeton, kiun ni ĉiuj spektos post kelkaj tagoj. Efektive, estas Radio-Kvizo, en kiu la ĉeestantaro rajtas respondi kaj partopreni. Do, por prepari nin por la Kvizo, mi planas prezenti al vi iujn kvizajn demandojn ĉiutage en la Fasko. Hodiaŭ, mi havas du demandojn por vi: unu tre simplan, kaj unu pli kompleksan, pri la interesa sud-afrika besto, la *orikteropo*.

Unue, la simplan: En la jaro 1880, grava scienca revuo fondiĝis, kiu ankoraŭ ekzistas. Ĉu vi povas

malkovri la nomon de tiu periodaĵo? Se vi deziras, aldonu al via respondo interesajn faktetojn pri tiu revuo.

La orikteropo estas interesa besto kun amuza nomo. Vi verŝajne konas ĝin per sia alia amuza nomo en la afrikansa lingvo, *aardvark*. Kiel vi scias, ĝi estas mambesto, kiu ĉefe manĝas formikojn kaj termitojn. Sed ĉu vi sciis ke ĝi necese devas manĝi ankaŭ fruktojn? Ĝi havas unikajn dentojn, kiuj kreskas en la formo de faskoj de tuboj. Malgraŭ la dentoj, ĝi ĉefe manĝas per la longa lango, kiu estas glueca. Mi instigas vin legi la artikolon pri la orikteropo en Vikipedio.

Sed mi ne kvizos vin pri la multaj interesaj detaloj en la vivo de la orikteropo, kiujn vi povos trovi en Interreto. Ne, la defio, kiun mi starigas al vi estas de alia speco. Vi devas aranĝi la ordon de tri kvantoj, de la plej malgranda ĝis la plej granda. Kiu el tiuj tri aferoj estas la plej granda: 1. La kvanto da adjektivoj, kiuj troviĝas en la difino de la vorto "orikteropo" en la reta versio de PIV (Plena Ilustrita Vortaro <<http://vortaro.net>>); 2. La kvanto da landoj en Afriko, en kiuj la orikteropo *ne* momente vivas nature kaj sovaĝe (ignoru la insulajn landojn); kaj 3). La nombro da ekzistantaj specioj de orikteropo, kiuj nun vivas en la diversaj landoj de Afriko.

## Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 7:30 – 8:15 atm  
Matenmanĝo  
*Belk Dining Hall*
- ★ 8:30 – 12:15 ptm  
Lecionoj  
*Flowe*
- ★ 12:30 – 1:15 ptm  
Tagmanĝo  
*Belk Dining Hall*
- ★ 2:00 – 3:15 ptm  
KTF: metiejo pri sonredaktado (kunportu komputilon)
- ★ 3:15 – 4:30 ptm  
KTF: provludado de radioprogramoj
- ★ 5:45 – 6:30 ptm  
Vespermanĝo  
*Belk Dining Hall*
- ★ 7:00 – 8:00 ptm:  
Tomaso ALEXANDER prezentos la lingvoreformojn, kiujn Zamenhof proponis en 1894  
*Flowe*



La tuta kalendaro troviĝas sur blanka tabulo en la unua etaĝo de nia dormejo.

Sendu viajn respondojn al mia retpoŝtadreso <[derek@unm.edu](mailto:derek@unm.edu)>. Aŭ metu vian respondon en Tvitero kun kradvorto #NASK2016. Vi rajtas detale esplori pri la informoj, aŭ simple konjekti pri kiu estas la plej malgranda, la meza, kaj la plej granda el tiuj tri kvantoj. Mi aperigos la solvojn en sekva numero de la Fasko.

**Noto de Ellen: Bv. ne iri al la manĝejo pli frue ol 12:30 por tagmanĝo;** alia studgrupo uzas ĝin tiam, kaj kiam ni venas tro frue, oni plendas. Dankon.

La NASKa Fasko estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Sendu poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn al la redaktoro (aŭ eĉ am-leterojn al li), artikolojn pri viaj ŝatokupoj... ktp.

Portu viajn kontribuojn al la redakcejo en ĉambro 112, aŭ eĉ pli bone, sendu ilin al <[nask.esperanto@gmail.com](mailto:nask.esperanto@gmail.com)>.

**Kaj... se vi estas en la supera kurso,** bonvolu volontuli por helpi lernantojn en aliaj niveloj verki aŭ poluri siajn verkojn.

# Vendejoj apud la universitato

[Nia lernanto Kristofo, kiu loĝas ĉi tie en Raleigh, afable pretigis por ni liston de proksimaj vendejoj. –Red.]

## • Apoteko

- Person Street Pharmacy  
702 N Person St.

## • Kafejoj


- Brew Coffee Bar  
111 Seaboard Ave #116
- Night Kitchen  
10 W. Franklin St #140

## • Trinkejoj

- The Station at Person Street  
701 N. Person St
- Oak and Dagger Bottle Shop  
18 Seaboard Ave #150

## • Manĝejoj

- Bad Daddy's Burger Bar  
111 Seaboard Ave
- Peace China  
802 Semart Dr
- Krispy Kreme Donuts  
549 N. Person St.



Vizitu <<http://bit.ly/NASKMapo>> por vidi pli detalan mapon.

## Vortenigmo

En la suba literosupo nia lernanto Makis DIRAS kaŝis 24 bazajn radikojn de Esperanto. Li aranĝis ilin vertikale, horizontale, kaj oblikve. Kiom vi povas trovi? Donu vian solvon al Makis: li havas premiojn por tiuj, kiuj plej bone (kaj frue) solvos la enigmon.



**Ĉu vi...  
tvitas?**

*tvit',  
tvit!*

Bonvolu uzi la kradvorton #NASK2016 kaj afiŝu fotojn, filmojn, aŭ komentojn pri NASK kaj KTF! Vi povas ankaŭ aboni la konton @NASK2016WPU por vidi la afiŝojn de aliaj. Se vi bezonas helpon, retpoŝtu al Kristofo ĉe <[cdj2981@gmail.com](mailto:cdj2981@gmail.com)> aŭ trovu lin en la manĝejo dum tagmanĝo.